


# TEA-BULTENO

9A JARO | JULIO - AŬGUSTO 2006 | NUMEROJ 7-8

## *Kio okazis en Triesto celebre de 100-jariĝo de Triesta Esperanto-Asocio?*

*La Redaktanto Elda*

En la pasinta numero de Tea-Bulteno, estis anoncitaj du gravaj manifestacioj, unu en majo kaj la alia en junio. Jam ili estas for kaj la organizintoj, lacaj sed tre kontentaj kaj ĉefe (ĉu eble tro malmodeste?) tre fieraj pri la rezultoj, jam tostis triumfe al la sukcesintaj aranĝoj.

Sabaton la 13an de majo estis celebrita la Solena Diservo ĉe Preĝejo Beata Virgulino de l' Rozario: la ejo plenplenis, ĉiuj benkoj estis okupitaj, multegaj personoj staradis dum la tuta celebrado, kun tre impresodona partopreno. Ŝvebis en la aero la mirindaj, sugestoplenaj voĉoj de la koruso direktita de Bruno De Caro, dum la esperantlingva servado estis varmkore sekvata de la tuta ĉeestantaro. La triesta Episkopo Eŭgeno Ravignani honoris nin per sia tuttempa ĉeesto kaj per sia parolado, en Esperanto kompreneble! Regis en la preĝejo intense emocia etoso, kiu kaptis ĉiun fidelulon, ĉu esperantista aŭ ne. Nu, vere inda komenco de nia festado honore al Triesta Esperanto-Asocio!

**Dua** aranĝo, la Ekspozicio de Esperantaj bildkartoj, organizita de Triesta Komunumo, Departemento pri Kulturo, kunlabore kun Triesta Esperanto-Asocio, en Palaco *Costanzi* de la 10a de junio ĝis la 2a de julio. La streĉaj kaj lacigaj preparlaboroj estis fine kronitaj per neantaŭvidita sukceso! Sed la tuta aranĝo ne estus tiele sukcesinta sen la valorega kaj profesieca kontribuo de Davide Amadei el Bolonjo, kiu, dum pluraj tagoj, inventis, fantazie kreis kaj kune kun ni realigis vere altnivelan kaj imponan ekspozicion. Sen liaj helpemo kaj kunlaboro, ni ne kapablus prezenti la eksponaĵojn en tiel tikla, stimula, signifoplena maniero: al li ni ŝuldas ĉiajn pozitivajn akirojn! La ekspozicio estis vizitita de ĉirkaŭ mil kvincent personoj: jam tio donas la ideon pri la kontentiga rezulto, konsidere ankaŭ de la periodo kaj de temo ne tiom vaste konata de la publiko.

Alcele efikis la propagando, farita per afiŝoj disaj tra la urbo (*ĉi tiujn, samkiel la cent-jariĝan simbolon, projektis Eraldo Sepulcri*), distribuado de miloj da faldfolioj kaj invitiloj kaj per artikoloj perradiaj, televidaj kaj ĵurnalaj, ĉio ĉi farita danke al malavara subteno de la urba Komunumo. Laŭ kio oni povas taksi, ĉu vere la ekspozicio estis aprecata aŭ ne? Ekzemple el la komentoj skribitaj en la gasto-libro, kiu interalie estas aparte interesa pro ties kompostado, brila ideo de Davide. Pli ol kvincent estis la skribitaj opinioj de la vizitantoj. Mi citas nur kelkajn, kvankam la tuta libro estas inda je ellegado:

- ★ Kia surprizo: mi sciis pri la ekzisto de esperanto, sed ne opiniis tiel ampleksa ĝian disvastiĝon.
- ★ Ĉi mesaĝo de paco kaj universala interfratiĝo, esprimita per ĉi tiu lingvo, estas donaco por la tuta homaro. Gratulojn pro via agado!
- ★ Dankon, ĉar mi malkovris nekonatan mondon!
- ★ Ĉiu ajn lingvo donas al kiu ĝin amas tutan mondon. Esperanto transen iras kaj donas la tutan Universon.
- ★ Multon mi aprecis la originalecon de la ekspozicio kaj la ateston de tiuj kiuj dum tuta jarcento kredis kaj kredas je paco kaj amikeco inter la popoloj.
- ★ Ni igu tiel ke revoj kaj realo samcelu por pli bona estonteco.
- ★ Ŝajnas facila... sed - kiu scias? - kial "oni ne povas aŭ ... oni ne volas!?!" *(komento farita en triesta dialekto)*
- ★ Mi tre ŝatus, ke ĉiuj parolu Esperante, sed kio plej plaĉis al mi estas la karto, kiu turniĝas montrante vizaĝon jen gajan jen malgajan. *(Virginia, 9 jaroj)*
- ★ Gratulojn pro la interesa elmontrado. Esperanto... finfine videbla!
- ★ Gratulojn! Tre bela sperto: plonĝado en pasintecon rigarde al estonteco!

Kompreneble estis ankaŭ mesaĝoj malaprobaj kaj iom polemikaj, tamen la plej parto estis pozitivaj kaj tre kuraĝigaj. Ne nur triestanoj vizitis la ekspozicion, sed ankaŭ pluraj turistoj el diversaj italaj urboj kaj eĉ el aliaj kontinentoj: salutojn ni ricevis el Massachusetts kaj New Jork, Porto Feliz, Sidney, Hanoi, Singapuro, kaj el Belgio, Ĉeĥio kaj Aŭstrio. La interesiĝintoj ricevis informojn pri adresoj de Esperanto-Grupoj en sia hejmloko. Interese, ĉu ne? Ĉiam kaj ĉiel ni estas internaciaj!

Dum la vizithoraro estis disdonitaj centoj da propagandiloj pri Esperanto kaj pri aktiveco de TEA: la publiko, ĝenerale tre interesata, reagis tre favore al niaj proponoj pri lernado de la lingvo, kio esperigas nin pri kursa agado pli intensa dum la venontaj monatoj.

Sed ne nur simplan, eldiran rekonon de la valoro de Esperanto kaj de la multfacete intensa agado de centjariĝanta Asocio oni ricevis, eĉ pli konkrete oni atestis sian simpation kaj prikonsideron: la Skabeno pri Kulturo jese respondis al peto de nia prezidanto pri restaŭrado de la portreto de la unua TEA-Prezidanto, d-ro Arturo Ghez. Nun ĝi troviĝas en la spertaj manoj de fakulino, laboranta ĉe la Urbaj Muzeoj, sub direktorado de d-ro Dugulin. Kaj ne nur tio: multon pli vi povos aŭdi, ***vendredon la 21an de julio, ekde la 20a horo, dum la somera Festo ĉe sidejo, kiam ni tostos je niaj intaj kaj ĉefe ontaj sukcesoj, antaŭ ol komenci nian meritatan feriperiodon.***

**ATENTU! ATENTU! ATENTU!**

**TEA-sidejo estos fermita ekde la 22a de julio ĝis la 31a de aŭgusto. Bonan feriadon al vi ĉiuj kaj ni revidos nin je la 1a de Septembro!**

## PROGRAMO EN KAJ EKSTER TEA

Jen provizora programo pri TEA-agado en la venontaj monatoj: vi estas varme petataj diskonigi ĝin inter konatuloj kaj nekonatuloj, ĉar kelkaj eroj estas aparte adresitaj al neesperantista publiko, varbo- kaj propagandocele! Povas tamen okazi ŝanĝoj en la suba programo, do sekve ĉiam atente legu la venontajn TEA-Bultenojn.

| | |
|---|---|
| **ekde dimanĉo la 6ª ĝis sabato la 12ª de aŭgusto** | INTER KARSTO KAJ MARO<br>***1ª Internacia Somera Renkontiĝo***<br>Estas antaŭviditaj vizitoj de la Kasteloj de *Miramar*, *Duino* kaj Sankta Justo; de la Giganta Groto kaj Karsta Domo; ŝipekskurso al *Muggia* kun vizito de la vilaĝo. Du matenojn oni pasigos sunbruniĝante kaj plonĝante en la maron (*Barcola*), dum en kelkaj vesperoj oni turismos tra la urbo. |

## OKTOBRO

| | |
|---|---|
| Merk. 11<br>h. 17.30 | **Sala Baroncini**<br>**Assicurazioni Generali, via Trento 8**<br>La homo elpensas la lingvon. Originoj de la homa kultura interkomunikado<br>*D-ro Romano Bolognesi* |
| Ven. 13<br>h. 18 | **Sideje**<br>Prezento de la baza kurso pri Esperanto kaj de la studprogramo.<br>*Elda Doerfler, Triesta Katedrestrino* |
| Mar. 17<br>h. 17.30 | **Sala Baroncini**<br>**Assicurazioni Generali, via Trento 8**<br>La homo elpensas la numerojn.<br>Origine de l' nombrado kaj kalkulado.<br>*D-ro Romano Bolognesi* |
| Mar. 17→<br>→ dim. 22 | 25-JARIĜO DE NOVA ESPERO FRIULI<br>Priaj programoj en Lignano Sabbiadoro |
| Ven. 20<br>h. 20 | **Sideje**<br>LECTURAE DANTIS esperante, itale kaj triestadialekte<br>*Zorge de Edvige Ackermann* |
| Ven. 27<br>h. 20 | **Sideje**<br>Litovio, malkovrinda Lando<br>*Filmo de Edvige Ackermann* |
| Mar. 31<br>h. 17.30 | **Sala Baroncini**<br>**Assicurazioni Generali, via Trento 8**<br>La homo elpensas la kalendaron.<br>Origine de la kalendaro.<br>*D-ro Romano Bolognesi* |


## NOVEMBRO

| | |
|---|---|
| Ven. 3<br>h. 20 | **Sideje**<br>Florenco 2006, la monda ĉefurbo de esperantistaro - *Filmo de Edvige Ackermann* |
| sab. 11 kaj<br>dim. 12 | **Ekskurso al Milano** por celebrado de la 100-jariĝo de la Milana Esperanto-Grupo |
| Ven. 17<br>h. 20 | **Sideje** - Gramatika problemo en Esperanto: la akuzativo<br>*Elda Doerfler, Triesta Katedrestro* |
| Dim. 19<br>h. 10.30 | **Kaštelir, Poreć (Kroatio)**<br>Festado de la "Nova Vino"<br>Internacia Aŭtuna renkontiĝo |
| Mar. 21<br>h. 17.30 | **Sala Baroncini,**<br>**Assicurazioni Generali, via Trento 8**<br>La homo elpensas la skribon.<br>De ideogramo al Aboco.<br>*D-ro Romano Bolognesi* |
| Ven. 24<br>h. 16 | **Supera Lernejo pri modernaj lingvoj por interpretistoj kaj tradukistoj**<br>**via Filzi, 14**<br>Kiel klasifiki la prepoziciojn?<br>Nova propono.<br>*Prof-ro Fabrizio Pennacchietti, docento ĉe la Universitato de Torino* |
| Merk. 29<br>h. 17.30 | **Sala Baroncini,**<br>**Assicurazioni Generali, via Trento 8**<br>Lingvoj kaj socio<br>*D-ro Romano Bolognesi* |

## DECEMBRO

| | |
|---|---|
| Ven. 1<br>h. 20 | **Sideje**<br>LECTURAE DANTIS esperante, itale kaj triestadialekte<br>*Zorge de Edvige Ackermann* |
| Mar. 12<br>h. 18 | **Sideje**<br>Kristnasko tra la mondo<br>*Inaŭguro de ekspozicio pri Kripoj kaj Kristnaskaj poŝtkartoj* |
| De merk. 13 al ven. 22<br>h. 17-19 | **Sideje**<br>Kristnasko tra la mondo<br>*Ekspozicio pri Kripoj kaj Kristnaskaj poŝtkartoj* |
| Ven. 15<br>h. 20 | **Sideje**<br>Naskiĝdatreveno de Ludoviko Lazaro Zamenhof: la Esperanta Literaturo |
| Dim. 17<br>h. 11 | **Sideje**<br>Ĝemeliĝa ceremonio kun la Esperanto-Grupo de Rijeka (Kroatio) |
| Ven. 29<br>h. 19.30 | **Sideje**<br>Konklude de la celebraj aranĝoj honore al 100-jariĝo de Triesta Esperanto-Asocio |


vanità
Ina vestaĵaro
Ĉio por novedzino
VANITÀ sas
di Dodi B. & De Rossi R.
34122 TRIESTE
Corso Italia, 37 - Tel. 040 632340
Cod. Fisc. e part. IVA 00082530320




## *REĜA KUSKUSO*

Recepto el Maroko

Tiu ĉi luksa varianto de la magrebdevena manĝaĵo, estas preparita per kuskuso, ŝaf- kaj kokviando kaj diversaj spicoj, kun legomoj kaj saŭco. Eĉ se la preparado estas iomete komplika, ĝin pretigi indas, por posta gustumado de aŭtentika frandaĵo.

La recepton mi trovis en kuirklubo@yahoogroups.com.

***INGREDIENCOJ (4 SAMTABLANOJ)***

| | |
|---|---|
| 350 g | da ŝafŝultraĵo en 4/5 pecoj |
| ½ kg | da kokido pecigita |
| 60 cl | da olivoleo |
| 1 | kukurbo |
| 2 | karotoj |
| 2 | napoj |
| 1 | celeria branĉo |
| 2 | paprikofruktoj, ĉiuj dispecigitaj |
| 200 g | da senŝeligitaj tomatoj |
| 200 g | da kikeroj boligitaj |
| 1 | malgranda cepo |
| 1 | elpremita ajlobulbero |
| 1/2 g | da safrano |
| 3,5 g | da *ras el hanout** |
| 1/2 kafkulero | da *harissa*** |
| 400 g | da kuskuso |
| | salo kaj pipro laŭ persona gusto |

***PREPARADO***

1. En premmarmito, antaŭkuire subrostu la viandojn en du supkuleroj da oleo, aldonu cepon, ajlobulberon kaj spicu per *ras-el-hanout** kaj *harissa***.
2. Elverŝu tomatojn kun propra suko kaj aldonu karotojn, napojn, celerion, paprikojn kaj 200 g da akvo.
3. Fermu la premmarmiton. Tuj kiam la vaporo ekeliĝas, malpliigu la fajron kaj kuiru dum 16 minutoj.
4. Dum la vaporkuirado, miksu kuskusan grajnon kun 5 supkuleroj da oleo kaj 50 cl da saligita akvo. Lasu ŝveli la grajnojn de kuskuso, movante ĝin de tempo al tempo.
5. Malfermu la premmarmiton. Aldonu la kukurbeton kaj kikerojn. Refermu la prem-marmiton kaj kuiru kromajn 5 minutojn, je reduktita fajro post eliĝo de la vaporo.
6. Malfermu la premmarmiton. Elprenu viandojn, legomojn kaj sukon, aparte konservante ĉion en varma ujo.
7. En la premmarmiton metu 75 cl da akvo kaj aldonu la ŝveliĝintan kuskusan grajnon (se eble, metu ĝin en la korbon por vaporkuirado).
8. Fermu la premmarmiton. Malpliigu la fajron, post vaporekeskapo, kaj kuiru 5 minutojn.
9. Surtabligu kaj ... Bonan Apetiton!

Notoj:

* tipe magreba 40-spica miksaĵo, anstataŭebla per tiu speciala spicmiksaĵo por rosti viandon;

** nordafrika spico el ruĝaj sekigitaj paprikoj kaj oleo, aĉetebla ĉe ekzotikaj vendejoj.

---

Solvo de la kvizo "La falsa monero", aperinta en maja-junia Bulteno, kaj anonco pri la premiito estos publikigitaj en septembra-oktobra TEA-Bulteno.

# Kial ĝi malaperis?

## *Kie hodiaŭ la aŭtomobilo je kunpremita aero?*

Ĝi nomiĝas "*Eolo*", kaj ties apero estis anoncita jam en 2001$^{a}$ jaro, kiel solvo por ĉiaj poluciaj kaj energiodonaj problemoj.

En tiu jaro, franca inĝeniero *Guy Nègre* vaste informis pri sia eltrovo, nome pri aŭtomobilo funkcianta per kunpremita aero, kio donis la premisojn por finfine forigi la polucian problemon en la tro trafikoplenaj urboj de la mondo. La koston de tiu veturilo oni kalkulis je ĉ. 10 mil eŭroj. Kaj plenigado de ties aerujo nur je 1,5 eŭroj. Sed ĝi ... iel malaperis!

Oni antaŭvidis ties ekvendon fine de 2002, sed *Eolo* neniam faris sian triumfan eniron sur la monda merkato.

Ĝia iama ttt-ejo estis anstataŭigita per la jena: www.eoloenergie.it, kie interalie troviĝas anonco pri produktado de aerkunpremita motoro.

Prezentita en Romo la 19$^{an}$ de januaro 2005, tiun motoron oni estus devinta instali en aŭto funkcianta per kunpremita aero septembre 2005 (tiu ĉi novaĵo eĉ nun ekzistas ĉe tiu ttt-ejo).

Sed oni ne iris preter la prezentado de iu eta traktoro samtipa en *L'Aquila*, la 20$^{an}$ de aprilo 2005. Demando ekestas: kio pri ties produktado?

Oni starigis fabrikon de 10 mil kvadrataj metroj apud Roma, kiu tamen ĝis nun produktis ... neniom.

Ties ĉirkaŭ 70 laboristoj, ĵus dungitaj, ekde tuj ripozis ricevante iom da mono de la salajrohelpa kaso.

La kialo? Iu direktoro de "EOLO ENERGIE" informis, ke *Nègre* rifuzas transdoni la projekton, tiel malhelpante ĉian aktivadon.

Teksto de *Carlo Dagradi*
el FOCUS – n. 163 – majo 2006

## NOVA ESPERO FRIULI FESTAS!!!


De la 17$^{a}$ ĝis la 22$^{a}$ de oktobro, en *Lignano Sabbiadoro*, okazos Nacia Kultura Manifestacio, organizita de Libertempa Fervojista Organizo el Udine: ties Kultura Sekcio, NOVA ESPERO FRIULI, enkadre de tiu aranĝo prezentos la jenan programon:

- Prelegoj de d-roj Serio Boschin kaj Romano Bolognesi
- Esperantlingva Di-Servo, celebrita de pastro Nello Marcuzzi
- Filatela ekspozicio pri Esperanto–poŝtmarkoj kaj –stampoj
- Ekspozicio de Esperantlingvaj libroj
- Emisioj de speciala poŝta karto, honore al la 25$^{a}$ fondiĝ-datreveno de NOVA ESPERO FRIULI, kaj de porokaza stampo.

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
**Sidejo**: Via Coroneo 15 - 34133 Trieste
**tel/fakso**: +39 040 763128
**Reto**: esperantotrieste@adriacom.it; noredv@tele2.it
**Grupa ttt-ejo**:://it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatriestina
**Poŝta adreso**: CP 601 c/o Ufficio Postale Trieste Centro
IT-34132 Trieste - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349



# Kurta KinoEsperanto Festivalo



Oni lanĉas internacian konkurson, je libervola temo, celebre de la centjariĝo de Triesta Esperanto-Asocio, pri kurtfilmoj ital- kaj/aŭ esperant-lingvaj, aŭ alilingvaj sed kun surskribaĵoj en la itala aŭ esperanta lingvo. La kurtfilmoj povas esti ankaŭ senparolaj.

**Arta Direktoro:**
Giampaolo COLONI
**Prezidanto de la Organiza Komitato:**
Edvige ACKERMANN

La verko, sendota al la konkurso, ne estu jam prezentita en aliaj similaj aranĝoj, tial la aŭtoro subskribu deklaron tiusence.

La kurtfilmo devas esti en formo de DVD aŭ VHS kaj ne superu 15-minutan daŭron. Ĝi ne estos redonita.

La aŭtoro sendu poŝte sian verkon ĝis la 15ª de decembro 2006, en registrita koverto kaj kun ricev-atesto, al tiu ĉi adreso:

**ESPERANTO TRIESTE**
**C.P. 601 c/o Ufficio Postale Trieste Centro**
**IT-34132 TRIESTE – ITALIA**

Krome estu provizitaj de la aŭtoro la jenaj informoj:

- vivpriskribo kun aldonita malgranda foto;
- mallonga resumo de la kurtfilmo, kelkaj fotoj, ties titolo kaj la genro, kiu estos elektita inter la sekvaj:
  *komika, horora, kultura-didaktika-dokumenta, komedia, drama, detektiva, fabela, folklora, muzika*;
- nomoj de la roluloj kaj de la aliaj aŭtoroj aŭ personoj iel kunlaborintaj en la filma realigado.

Eblas sendi ankaŭ kurtfilmojn jam prezentitajn en similaj aranĝoj, sed tiuj ĉi estos EKSTERKONKURSAJ.

***Atentu: estas nepre malpermesitaj porno-kurtfilmoj kaj tiuj kun perfortaj scenoj-temoj.***

Ĉiuj alvenintaj verkoj estos prezentataj al publiko okaze de la SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO - 19-25/02/2007, dum kvin vesperoj je senpaga eniro. La ĉeestonta publiko voĉdonos la plej bonajn verkojn kaj al tiu voĉdono, sumiĝos tiu de 5-persona ĵurio, kies nomojn oni diskonigos baldaŭ.

La kurtfilmoj, klasifikiĝintaj inter la unuaj tri, ricevos premion en formo de pokalo, plato, libroj, krome per projekciado de la verko en Interreto kaj similaj ĉeno-kinejoj. La decidoj de la ĵurio kaj de la publiko estas nepriapelaciebla.

Pliaj informoj ĉe: nored@tiscalinet.it kaj ĉe: www.blog.ialweb.it/esperantotrieste/